

ESPERANTO-INFORMILO



Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Rakonto
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Foto: Bildo 'Granda Eskapo', Verkisto: nekonata

La decembra eldono de la Esperanto-Infomilo aperas kunredaktita de Georgo (GH) kaj Ulriko (UF). La redaktoteamo deziras bonan legadon.

Kolofono

Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: Ulrich Fellmann

**Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main**

www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender: Georg Hennemann
georg.hennemann@t-online.de
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Klub-Abende

Klub-vesperoj

Dienstag, d. 5. Dezember 23

mardon, la 5-an de decembro 23

19:00 h MEST per Zoom

Offene Sprachrunde

19:00 h MEST per Zumo

Malferma babila rondo

Dienstag, d. 12. Dezember 23

mardon, la 12-an de decembro 23

19:00 h MEST per Zoom

Geschlossene Sprachrunde (nur Mitglieder)

19:00 h MEST per Zumo

Fermita babila rondo (nur klubanoj)

Zoom-Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

surloke:

Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt

Dienstag, d. 19. Dezember 23

mardon, la 19-an de decembro 23

19:00 h MEST surloke

Weihnachtsfeier

Kristnaska festo

El la klubo

Naskiĝtagoj

En decembro festos sian naskiĝtagon:

07.12. Eckard Beyer
13.12. Norbert Pulver

Ni kore gratulas!

Anoncoj:



Vendredo, 15.12.23 ESF solenas la **zamenhoftagon** en Stattkafejo, Gremppstr. 21
18:00-21:30



Mardo, 19.12.23 ESF **kristnaskfesto** en Saalbau MÜZ. Ĉiu pripensu kielmaniere kontribui, ĉu per kristnaska dekoracio, muziko, prelegeto, poemo, kuketo(j), trinkaĵoj ktp.



Prepariĝi por milito aŭ manifestacii por paco - ĉu samtempe eblas ?

Eseo de G. Hennemann

Ministro pri eksteraj aferoj Annalena Baerbock (Verduloj) avertis pri militlaceco jam printempo 2023. Defendministro Boris Pistorius (SPD) nun prenas aferojn plu kaj postulis fine de oktobro, ke Germanio devas fariĝi defenda kaj "militpreta". Necesas "ŝanĝo de pensmaniero" ne nur en la germana armeo (germane: Bundeswehr), sed en la tuta socio: "Ni devas alkutimiĝi al la ideo, ke povus esti minaco de milito en Eŭropo." Paroli pri milito fariĝis socie akceptebla: En majo 2010, la federacia prezidento Horst Köhler devis ekŝiĝi post kiam li malkaŝis dum vizito en Afganio tion, kion ĉiuj povis scii, sed kiu tiam estis ankoraŭ tabuo: „ke lando de nia grandeco kun ĉi tiu eksterkomerca orientiĝo kaj tiom ekstera komerca dependeco devas scii, ke en kazo de dubo, en kriz-okazo, milita agado estas necesa por protekti niajn interesojn, ekzemple liberkomercajn vojojn." Iom antaŭe, la tiama ministro pri defendo Karl-Theodor zu Guttenberg (CSU) nomis tion, kio okazis en Afganio, militon, kio estigis ekscititajn diskutojn ĉar la M-vorto estis evitita ĝis tiam. Milito - ĉi tiu terura, detrua afero, ĉi tiu lasta esprimo de patriarka kaj imperiista potenco kaj perforto - estas nun denove en la politika tagordo. Ne kiel io, kion ni devas sub ĉiuj cirkonstancoj malhelpi, sed kiel io, por kio ni devus prepariĝi.

Hieraŭ estis la 25-a de novembro '23 kaj mi ĉeestis la lastan vesperon de la Virtuala Kongreso de UEA. Estis tre interesaj diskuttrondoj ofertataj pri temoj kiel ateismo kaj pacifismo, kiujn mi ambaŭ partoprenis. Bedaŭrinde ĉeestis nur malmultaj kaj precipe maljunaj homoj, sed ĉiuj partoprenantoj bedaŭris ke la pacmovado nun estas tiom ŝrumpita kaj ke ĉie mankas publikaj manifestacioj por la paco kaj malarmado. Kaj tiuj malmultaj pacmanifestacioj krome estas infiltrita de t.n. Putin-Komprenantoj (germane: Putin-Versteher), do komunistoj aŭ ekstremdekstruloj kiuj simpatias kun la rusa agreso kiu celas malstabilizi nian okcidentajn demokratiojn. Do ni vere devas zorgi pri la libera malferma socio en kiu ni ankoraŭ vivas kaj la t.n. okcidentaj valoroj kiel klerismo, egalrajteco kaj la rajto esprimi sian opinion.

Tiurilate mi volas rememori pri la kimra filosofo, matematikisto kaj ateisto Bertrand Russel (* 18-a de majo 1872 apud Trellech, Monmouthshire, Kimrio; † 2-a februaro 1970 in Penrhynedeudraeth, Gwynedd, Kimrio), kiu estis membro de la frua pacmovado kaj kiu dum pluraj jaroj perletere korespondis kun Louis Couturat, unu el la gvidantoj de la [Ido-movado](#). Li pritraktis la temon de uzendaj lingvoj dum internaciaj interŝanĝoj. Russell subtenis la projekton de [internacia lingvo](#) kiel [Esperanto](#) en la [scienca kampo](#)^[24]. Li ankaŭ verkis en kampoj de politiko kaj pacifismo.

Li estis pacifisto en la unua mondmilito konsiderante ĝin prestiĝomilito, sed aprobis la duan mondmiliton, ne kun pasio, sed pro neceso. Ĉar ĝi estis kontraŭ totalisma diktatoro kaj lia pretendo je mondrigado. Kaj Russell konsideris militan defendon en la formo de partopreno en la milito prava kaj necesa. Li revenos al pacisma aktivismo en sia opozicio al la Vjetnama milito. Tiuj malsamaj sintenoj antaŭ milito, rilataj al kio en ĉiu kazo estas en danĝero, estas konataj kiel "relativa pacismo" kies plej aŭtenta reprezentanto estis Russell mem. Do li strike diferencigis inter "absoluta pacismo" kaj "relativa pacismo". En 1918 estis eldonita lia libro "Vojoj al libereco: socialismo, anarkiismo (angle: Roads to Freedom: Socialism, Anarchism)", kiu analizas plurajn politikajn teoriojn: la [socialismon](#) de la 19a jarcento, la [marksismon](#), la [anarkiismon](#), la [anarki-sindikatismon](#) kaj la [gildsocialismon](#). Ene de la libro li defendas nekapisman politikon en demokratia kunteksto. Laŭ li la plej bona teoria politiko estas gildsocialismo, kiu akceptas tion, kio estas plej validebla samtempe en la asertoj de la ŝtataj socialismoj kaj en la timo de la anarki-sindikatismuloj pro la ŝtato, elektante federisman sistemon inter la diversaj profesioj por similaj kialoj al tiuj, kiuj dezirigas la federismon inter la nacioj. Li multe prelegis kaj skribis ĉi-teme (Principoj de Socia Rekonstruo, 1916), tial li perdis sian laboron kiel profesoro en la universitato de Kembriĝo kaj malliberiĝis dum 6 monatoj. En 1950 li ricevis la Nobel-premion pri literaturo. Lia moralo resumiĝas je la kuniĝo de la amo kaj de la scio ^[23]: sen amo, la scio estas malvarma kaj maljusteca; sen scio, la amo (aŭ la bona volo: la deziro helpi sian proksimulon) estas malpotenca kaj eble eĉ malbona. Li ankaŭ estas aŭtoro de la verketo "Kial mi ne estas kristano" kaj de la analogio de la tekruĉo, kiujn ambaŭ mi tre ŝatas pro iliaj logikaj klarigoj. La simplaj logikaj tezoj de B. Russel estas bona bazo por mediti pri la maltrankvila tempo kiun ni nun spertas, kun politika kaj religia fanatismo, postvivantaj dogmoj pri dioj kaj infero, diaj punoj kaj iu iama ,homo' kristo, kiu laŭ la kvar apostoloj tute ne estis tiom bona kiel ĝenerale supozite.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Bertrand_Russell#cite_note-24

<https://www.swr.de/swr2/wissen/bertrand-russell-die-freiheit-des-denkens-sw2-wissen-2022-05-13-100.html>

<https://www.xn--untergrund-blittle-2qb.ch/gesellschaft/panorama/krieg-frieden-menschen-koennen-menschen-sein-8086.html>

http://www.esperanto.es:8080/xmlui/bitstream/handle/11013/3397/russell_kial-mi-ne-estas-kristano.pdf?sequence=1&isAllowed=y

https://www.scielo.org.mx/scielo.php?script=sci_arttext&pid=S1405-14352011000300005

https://www.planlingvoj.ch/Zamenhof_alvoko_diplomatoj1915.pdf

https://eo.wikipedia.org/wiki/Tekru%C4%89o_de_Russell

Rakonto

„Revo de fanatikulo“, de Ulrich Fellmann

Saluton!

Saluton!

Pardonu, vi aspektas kiel ...

Jes.

...Stanisław Lem!

Jes.

Kie mi estas? Kial vi ĉi-tie estas?

Vi estas en la Limbo.

Ĉu...

Kaj mi atendis ĉi-tie longan tempon al mia plej granda fano.

Ĉu!

Kiu ne nur legis miajn romanojn, sed eĉ mian ne multe konatan fruan biografion.

Ĝuste!

Sed ĝi aperis miascie nur en la lingvoj pola kaj germana, kaj ĝi estas sufiĉe olda.

Prave. Sed ĝi estis sufiĉe valora por mi!

Sed ĝi kovras nur mian junaĝon.

Bedaŭrinde jes. Sed mi intense legis kaj kunsentis viajn aventurojn kaj pensojn.

Mi scias. Kion vi plej ŝatis el mia verkaro?

Ĉion! Escepte de...

La Marsianon, ĉu?

Jes.

Estas tute en ordo.

Mi ĝojas...

Mi estis juna, nesperta, ne trovintis mian stilon.

Mi same pensis!

Ĉu vi povas ion citi de mi?

Jes. Antaŭnelonge eĉ plurfoje citis vin.

Kion?

Tion mi ŝatis, aforismo via:

"Neniu plu legas.

Se iu tamen legas, ne komprenas.

Se iu tamen foje komprenas, tuj forgesas."

Kial vi ŝatas tion?

Estas ja via tipa mikso de melankolia konstato de faktoj kaj fine tamen ridigo de la leganto pro la nelogikaĵo pro troigado.

Bone dirite. Sed tamen, nomu unu de miaj rakontoj kiun vi trovis aparte bona!

La revolucio de la lavaŝinoj!

Hehe! Bone!

Ankaŭ mi havas demandon al vi.

Demandu!

Kiu filmigo de Solaris plej plaĉis al vi?

Tiu de Tarkovskij. Ĝi estas hipnota!

Bonege! Ankaŭ mi preferas ĝin!

Mi scias. Nun venu kun mi, mi devis atendi sufiĉe longe por rakonti al vi miajn novajn ideojn!

--

El la Esperantuja historio:

Antaŭ 110 jaroj, la 3-an de decembro 1913, en Smolensko naskiĝis la esperantisto Nikolaj Ritjkov. Li eklernis Esperanton en la jaro 1926 ĉe Roman Nikoljskij. Esperanto iĝis ĉefa parto de lia vivo. Li ofte esperantlingve deklamis dum kunvenoj de moskvaj esperantistoj, precipe poemojn de Kálmán Kalocsaj kaj Vladmir Majakovskij. Tie li ankaŭ prezentis sian revon: ludi la rolon de Lenin.

Ekde la jaro 1933 li estis aktoro de la Teatro Lenin-Komsomol en Moskvo. Kiel aktiva membro de Sovjetrespublikara Esperantista Unio (SEU), li en 1938 estis deklarita, kiel aliaj esperantistoj, aparteni al spiona organizaĵo, kaj tial poste ekzilita al Kolima en Siberio, kie li pasigis ok jarojn. La ceteron de sia vivo li devintus pasigi en la ekstrema nordo de Sovjetio. Post la morto de Josif Stalin li ekde 1956 estis senkulpigita kaj liberigita. Reveninte al Moskvo li denove aktoris en la Teatro Lenin-Komsomol kaj rolis en filmoj kaj ĉe la radio kaj televido en Sovjetunio.

En 1963 Nikolaj Rytjkov debutis antaŭ la internacia Esperanto-publiko dum la 48-a UK en Sofio. Perdinte sian kredon pri perspektivoj de Esperanto en Sovjetunio, li en 1965, post fino de la Esperanto-konferenco en Vieno, tie petis politikan azilon. Li trovis laboron kiel parolisto kaj lingva redaktanto en la rusa sekcio de la brita radiostacio BBC, kiu i.a. elsendis liajn deklamojn de "En la Unua Rondo" kaj "Kancera Hospitalo" de Aleksandr Solĵenicin en la rusa lingvo kaj Esperanto (kiun li mem tradukis al Esperanto).

Ekde la jaro 1965 li ofte recitadis en la Esperanto-Kongresoj en Eŭropo, lastfoje dum la 56-a Universala Kongreso en Londono en 1971.

Li germanlingve ludis la rolon de Lenin, tiel realiginte sian revon, en la okcidentgermanuja televida filmo "Intercivitana milito en Rusio", kiu estis elsendita ekde la 3a de novembro 1967, okaze de la 50-jariĝo de la Oktobra Revolucio.

Kiel kunaŭtoro li partoprenis en la preparado de la rusa-esperanta vortaro de Eŭgeno A. Bokarev. Li okupiĝis pri radiokurso de Esperanto elsendota de universitataj radio-stacioj, kiam morto ĉesigis lian agadon la 1-an de septembro 1973 en Londono, pro stomaka kancero.

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

En la lernohoro de kemio:

- Kio okazas, kiam oni lasas oron kuŝanta en freŝa aero?
- Ĝi estas ŝtelata.

Proverbo de la monato (de G. Hennemann)

La proverbo, kiun mi ĉi-monate prezentas, temas pri promesoj :

„Promeso estas larĝa, plenumo estas ŝarĝa.“

Tiu proverbo tre bone priskribas la situacion en kiu nia nuna semafor-registaro manovris sin promesante grandan buĝeton kun mono origine rezervita por aliaj celoj. La plenumo de la planoj promesitaj nun fariĝas streĉa kaj ŝarĝa.

Fonto: http://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_002102.htm

Enigmo (de Felmano Ulriko)

Solvo de la enigmo el la lasta ei (de Felmano Ulriko)

Lastafoje mi prezentis kelkajn vortojn kun traduko, kaj vi devenintu, el kiu lingvo la vortoj estas. Du parte solvis, sed neniuj havis pli ol tri. Jen la solvoj:

Aloha - estas el la Haŭajia lingvo.

Bilita mpash - el la Bantua lingvo.

Cacharpaya - el la Hispana.

Dapjeongneo - el la Korea.

Estaĝfurullah - el la Turka.

Fylleangst - el la Norvega.

Gemas - el la Indonezia.

Kaj nova enigmaro

La sekvaj frazoj venas el kvar lingvoj, la eŭska, la japana, la kartvela, kaj la ubiĥa. Mi skribis ilin ĉiuj per latinaj literoj por faciligi la aferon. Ĉu vi kapablas diri, kiu frazo apartenas al kiu lingvo?

(1) Tsukue-no ue-ni zasshi-ga arimasu. - Sur la tablo kuŝas gazeto.

(2) Ardo-a ala garagardo-a? - Ĉu vinon aŭ bieron?

(3) Ra lamazad natkvamia! - Kiel bone dirite tio estas!

(4) Aŝen kjemilen ŝwegi miŝin! - Se oni ne komencas, nenio okazos!

Lasta paĝo

Dekalogo de Bertrand Russel

La Liberala Dekalogo de Bertrand Russell aperis unue ĉe la fino de lia artikolo " La Plej Bona Respondo al Fanatismo: Liberalismo (angle: The Best Answer to Fanaticism: Liberalism)" en la NewYorkTimes revuo la 16-an de decembro 1951. Russell skribis: La esenco de la liberala sinteno povus eble esti resumita en nova Dekalogo, ne pri tio por anstataŭigi la malnovan, sed nur por ĝin kompletigi. La Dek Ordonoj, kiujn mi ŝatus proklami kiel instruisto, povus esti jenaj:

1. Ne estu tute certa pri io ajn.
2. Ne serĉu kaŝi faktojn, ĉar ili certe iam venos al la lumo.
3. Neniam provu malhelpi iun pensi mem; vi eble sukcesos.
4. Se iu kontraŭdiras vin, ĉu ĝi estas via geedzo aŭ via infano, provu renkonti ilin per argumentoj kaj ne kun aŭtoritato, ĉar venko per aŭtoritato estas nereala kaj iluzia.
5. Ne respektu la aŭtoritaton de aliaj, ĉar ĉiam estas aŭtoritatoj, kiuj havas alian opinion.
6. Neniam uzu forton por subpremi kredojn, kiujn vi konsideras malutilaj, alie tiuj kredoj premos vin.
7. Ne timu esprimi ekscentrajn opiniojn; Ĉiu opinio, kiu estas ofta hodiaŭ, estis iam ekscentra.
8. Ĝuu inteligentan malkonsenton pli ol pasiva interkonsento; ĉar se inteligenteco valoras tiom kiom ĝi devus esti valora por vi, tiam en kontraŭdiro kuŝas pli profunda interkonsento.
9. Restu al la vero eĉ kiam ĝi ne konformas al la koncepto; ĉar ĝi taŭgas eĉ malpli al la koncepto se vi provas kaŝi ĝin.
10. Ne enviu la feliĉon de tiuj, kiuj loĝas en paradizo de malsaĝo; ĉar nur malsaĝulo povus konsideri ĉi tiun feliĉon.

Fonto: https://www.achgut.com/artikel/die_beste_antwort_auf_fanatismus_ein_liberaler_dekalog/

Varmega tekruĉo ĉirkaŭcirklas la sunon inter Marso kaj tero. Pruvo la malon.

